

BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 4a — Aprilo 1954a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

La Eksigo de D-ro Kempeneers

Jam antaŭ pluraj monatoj, D-ro P. Kempeneers anoncis sian nerevokeblan decidon ekŝiĝi el sia funkcio de Prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Kaj la administrantaro de nia Ligo jam komisiis min, en la komenco de tiu ĉi jaro, lin fakte ekanstataŭi, kiam ĝi kunmetis la estraron por 1954a.

Reĝa Belga Ligo Esperantista estas tamen laŭleĝa „Societo sen Profita Celo”, kun ĝenerala jarkunsido, kiu devige okazas en la monato de aprilo.

Estas dum tiu ĉi kunsido, ke laŭstatute okazas la ekŝigoj kaj elektoj. Estas do dum la kunsido, kiu okazos sabaton, la 24an de aprilo, je la 16a horo en la Brasserie de la Justice”, Justeca Placo, en Bruselo (apud la Centra Stacidomo), ke D-ro Kempeneers oficiale ekŝigos.

Tiuj laŭleĝaj oficialaj jarkunsidoj ordinare ne estas ĉeestataj de multaj membroj. Temas nur pri legado de kelkaj oficialaj dokumentoj kaj pri elektoj.

Mi estas certa, ke mi respondas al eldirita kaj intima deziro de niaj membroj, se mi prokrastos la veran solenan dankesprimon de niaj membroj al nia prezidinto, ĝis dum la kunsido de R.B.L.E. en la Lieĝa Kongreso, kiu okazos nur kelkajn semajnojn poste kaj kiun ĉiam ĉeestas multaj gemembroj.

Mi tamen ne povos, tute ne povos, ekŝidiĝi tiun aprilan tagon en la prezidantan seĝon, ne dirante kelkajn vortojn de dankemo al nia amiko D-ro P. Kempeneers, nome de la administrantaro kaj ankaŭ nome de tiuj membroj kiuj ĉeestos.

Kaj estus do, laŭ mi, dezirinde, ke tiuj, kiuj ĉeestos, tamen iome reprezentu la nacian movadon kaj venu, se eble, el la diversaj landpartoj.

Mi scias, ke sabata tago estas eble bona tago por laboraj kunsidoj, ne por kunvoko de festaj aranĝoj sur nacia kampo kaj ke multaj tute ne povos liberigi sin.

Mi tamen alvokas ĉiujn, kiuj iele povas sin liberigi, por ke ili ĉestu nian ĝeneralan kunsidon kaj tiel helpu, por ke la transdono de povojo iĝu, se ne tre ceremonia, tamen iom inda je nia Ligo.

Mi antaŭdankas ilin, en mia propra nomo... sed, mi estas certa, ankaŭ en la nomo de nia ekŝiganta prezidanto.

Li kaj mi do esperas vin baldaŭ renkonti en nia amika belgliga rondo.

Maur. Jaumotte

La 2.000

Kiam Haarlem estis elektata kiel Kongresurbo por la Universala 1954a, la L.K.K. tuj informis la samideanaron, ke la salonoj kaj la loĝkapabloj en tiu ĉi urbo ne permesas antaŭvidi partoprenon de pli ol dumil samideanoj.

Ĝi do avertis ĉiujn ke, je la momento kiam la dumila kongresano estos enskribita, ĝi rezervigas al si la rajton ne plu akcepti unu plian enskribon.

Kaj ĉiunmonate statistiko aperis, kun la kompara cifero por Zagreb je la sama momento de la jaro, kaj oni do jam de longe povis antaŭvidi, ke la numero 2.000 estos atingata multe pli frue ol pasintan jaron; multe pli frue cetere, ol por kiu ajn antaŭa kongreso en la lastaj jaroj.

Ne multaj tamen pensis, ke tiu cifero estus jam atingita en la mezo de la monato de marto.

Tia tamen estas la situacio, ke la L.K.K., jam je tiu ĉi momento, devas rifuzi novajn aliĝojn, krom se, kompreneble, ĝi povus intertempe ankoraŭ trovi solvon al tiu malfacila problemo.

Estas fakto ja ne ĝojiga rifuzi partoprenantojn por niaj internaciaj jarfestoj... Sed aliflanke, ĉiu kiu vizitas Kongreson tamen devas havi la certecon, ke li trovos en la salono por la Inaŭgura Solena Kunsido oportunan lokon kaj same ĉe la diversaj aliaj aranĝoj.

Momente do, oni ne plu sendu aliĝilojn al la L.K.K. en Haarlem, sed tiuj kiuj vere intencis vojaĝi tien kaj kiuj, malgraŭ la avertoj, tamen forĝesis enskribigi sin sufiĉe frutempe, eventuale avertu la sekretariejon de nia Ligo, ke ili ne nur estis, sed restas kandidatoj... okaze de ŝanĝo en la L.K.K. decido.

Tio tamen neniel signifas, ke ni povas doni al ili iun esperon tiurilate... Neniu rajtas efektive sin enmiksi en la laboron de la L.K.K., kiu mem devas scii, ĉu eblas aŭ neblas akcepti pli grandan nombron da partoprenantoj... kaj kiu decida. B. E.



39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando.

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Nro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Marton 1954

Pagoj: Al Rotterdamsche Bank, Haarlem, al Poŝtgirkonto 604997 kaj al Perantoj en diversaj landoj. L.K.K. akceptas pagilojn ŝanĝeblajn en banko sed absolute ne povas akcepti varojn aŭ librojn kiel pagon. Sendu Aliĝilojn, Mendilojn kaj pagojn al la sama instanco: ĉu L.K.K., ĉu peranto. **Grave:** Por eksterlandaj ĉekoj la banko postulas makleron de guld. 0.50. Preskaŭ neniu ĝis nun aldonis tiun sumon. (= 2 rpk.).

Mendoj: Kvankam la Dua Bulteno kaj Instrukcioj pri mendoj estas en kiel eble plej simpla lingvo multaj faras erarojn. Sajnas ke oni ne legas la instrukciojn. Erarajn kaj fuŝitajn Mendilojn la L.K.K. resendis. Ne antaŭpago loĝadon kaj ekskursojn.

Programo: Iuj ne mendas la matenajn ekskursojn ĉar ili ne scias la programon. Ankaŭ L.K.K. ne scias ĉar ĝi estas difinita nur je Pasko. Tamen preskaŭ certe oni povas kalkuli pri la jenaj: lundon matene: kunsido de U.E.A.; lundon ptm.: Laborkunsido; mardon matene: Laborkunsido; mardon ptm.: fakaj kunvenoj; merkredon matene: Belartaj Konkursoj; merkredon ptm.: Oratora Konkurso; vendredon matene: Kunveno de U.E.A.; vendredon ptm.: fakaj kunvenoj, Akademio.

Junulara Programo: Evidentas, ke granda nombro da ĝeĵunuloj inter la aĝoj 6 kaj 16 jaroj partoprenos la kongreson. La L.K.K. tial okupiĝas pri diversaj programoj speciale por tiuj junuloj. Tio verŝajne enhavos vizitojn, ekskursojn, distraĵojn. Detaloj sekvos.

Adresoj: Kelkaj poŝtajoj revenis kun indiko „Nekonata“. Bonvolu tuj sciigi al L.K.K. en okazo de adresa ŝanĝo.

Esperanta Seminario: En la 3 tagoj antaŭ la U.K. okazos en Haarlem Seminario por Cseh-instruistoj. Informoj haveblaj ĉe: Internacia Esperanto-Inst., Rlooustraat 172, Den Haag.

Bultenoj: Ne aperos nova bulteno. La venonta dokumento de L.K.K. estos la Kongresa Libro (nun en preparo). Espereble ĝi atingos ĉiun aliĝinton frue en junio.

Limdato/Limcifero: L.K.K. denove atentigas pri la limigo de partopreno en la kongreso. La maksimuma partopreno en la kongreso estas 2000 kaj kiam tiu cifero estos atingita L.K.K. rezervas al si la rajton rifuzi pliajn aliĝojn. Cetere neniu povos aliĝi post 30-a de junio 1954.

Statistiko: Aŭstralio 1, Aŭstrio 12, Belgujo 50, Brazilio 3, Britujo 231, Danujo 53, Finnlando 31, Francujo 188, Germanujo 188, Hispanujo 16, Indonezio 1, Italujo 50, Japanujo 1, Jugoslavio 68, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 471, Norvegujo 70, Novzelando 11, Portugalujo 7, Svedujo 143, Svislando 24, Turkujo 2, Usono 7. Sumo el 25 landoj 1635 pasintjare 745. (Lasthora sciigo: 2000 atingitaj! Aliĝoj ne plu akceptataj! — Red.).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario

Nia Peto

En nia antaŭa numero ni petis tiujn kiuj posedas numeron unuan aŭ duan de nia revuo (januaro kaj februaro do) kiun ili ne deziras konservi, ke ili resendu al ni por ke ni povu havigi al niaj novaj abonantoj.

Ni dankas tiujn kiuj eĉ el eksterlando... eĉ el ekster-Eŭropo resendis al ni ekzemplerojn kaj ankoraŭ ĉiam danke-ricevos pliajn.

Dankon!

La Antaŭkongreso en Antverpeno

Ni ne donas novaĵojn en tiu ĉi numero pri la antaŭkongreso kiu okazos en Antverpeno, la 29-an, 30-an kaj 31-an de julio.

Ni deziras ke niaj legantoj unue pensu pri la Beneluksa Kongreso en Lieĝo kaj aliĝu al ĝi antaŭ ol ili pensu pri la okazontaĵoj de julio.

Ni tamen povas diri ke jam pluraj kongresanoj por Haarlem ensendis kotizon por aliĝi al la Antaŭkongreso.

Kaj ni atendas ankoraŭ multajn aliajn el en- kaj eksterlando.

LA POSTKONGRESOJ EN NEDERLANDO

Tuj post la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem okazos postkongresoj en Leeuwarden kaj Rotterdam.

Ĉiuj, kiuj aliĝis al la 39-a U.K., jam ricevis kune kun la Dua Bulteno plaĉaspektan faldfoliojn pri la provinco Friesland kaj informojn pri la Leeuwardena postkongreso.

Ĉi sube sekvas informoj pri la postkongreso en Rotterdam: 7 VIII; 14-a h. Malfermo de la akceptejo kaj informejo; disdono de la dokumentoj.

8 VIII; 13-a h. Komuna lunĉo; aŭto-busekskurso tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. 17.30 h. Komuna tagmanĝo.

9 VIII; Posttagmeze granda ekskurso, i.a. tra la famkonataj havenoj; komuna tagmanĝo survoje.

10 VIII; Matene vizito al brandfarejo en Schiedam aŭ alia interesa fabriko; lunĉo. 20-a h. Festvespero.

11 VIII; 10.30 h. Kafo kun kukajo; ferio kaj adiaŭo.

La kongreskotizo, kiu inkluzivas ĉiujn suprenomitajn aranĝojn, estas gld. 40,—.

Hotelprezoj (inkl. de matenmanĝo kaj trinkmono) 6—14.50 gld. por unu persono dum unu nokto.

La eksterlandanoj, kiuj vizitos Nederlando, certe dezirus vidi la urbon, pri kiu ili legis kun premita koro antaŭ 14 jaroj. Ili povos vidi ne nur multajn postsignojn de la milito, sed ankaŭ grandiozajn riparojn, i.a. la Grandkomercan Domegon, novajn bankojn, kaj butikojn, eĉ tute novajn stratojn en la centro de la malnova urbo. Cetere la urbo havas multajn vidindaĵojn, la havenojn, la tunelon, muzeojn, malnovajn kaj novajn loĝkvartalojn, ktp.

Do...kaptu la okazon!

Petu aliĝilon de s-ro J. M. J. Driksen, S. Mullerstraat 7a, Rotterdam-W. La aliĝilo donas detalajn indikojn pri la pagmaniero.

Kion alportos Montevideo?

Ĉiu scias ke, dum la proksima aŭtuno, okazos en Montevideo por ni tre grava Konferenco de UNESKO, kiu prenos decidon rilate al la sekvo donota al la granda petskribo organizita antaŭ kelkaj jaroj de U.E.A. kaj al kiu partoprenis proksimume unu miliono da individuoj kaj 500 da societoj kaj entreprenoj kun ĉirkaŭ 15 milionoj da membroj.

Ĉiuj registaroj, aliĝintaj al UNESKO, estis petataj ensendi sian antaŭopinion pri la demando kaj laŭ tio, kion ni nun eksciis, jam diversaj registaroj ensendis sian raporton al la sekretario de UNESKO en Parizo.

Inter tiuj respondoj dekunu jam estas favoraj al Esperanto, nome tiuj de Aŭstrujo, Guatemala, Hispanujo, Honduras, Jugoslavio, Kamboĝo, Kuba, Libanono, Meksiko, Norvegujo kaj Urugvajo.

Ni aldonu ke Aŭstrujo proponis eĉ la starigon de internacia konvencio por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj deklaris sin preta mem fari tiun enkondukon, tuj kiam almenaŭ kvar aliaj ŝtatoj estos akceptintaj agi same.

Kuraĝiga fakto, kiu devas instigi nin al plia laboro dum la tuj estontaj monatoj.

ESPERANTISTA FERIO EN KASTELO MÜNCHENWILER

Estas signo pri la kreskanta signifo kaj rekono de Esperanto, ke proponas ekstermovadaj instancoj al ni aranĝojn, kiujn ni mem jam delonge sopiris realigi, sen ke ni havis la eblecojn. Tia eksterordinara ŝanco prezentiĝas nun kiel sekvo de la koordinitaj kursoj, kiuj ja ankaŭ estas dankendaj al la iniciato de la Popolaj Altlernejoj. Tamas pri feria kurso okazonta en aŭgusto en la belega kastelo Münchenwiler apud Murten, Kvankam ekzistas libertempaj kursoj ankaŭ en aliaj landoj, precipe nordaj, ni kredas ke la allogo de Bela Svislando kaj la lokigo de la kurso en interesa kaj komforta kastelo estas sufiĉe instigaj por altiri la necesan nombron da interesuloj. Kvardek partoprenantoj estas la maksimumo kaj dudek la minimumo; ni atendas kaj svisajn kaj eksterlandajn gastojn. Ni petas ĉiujn samideanojn turni sian atenton al tiu grava afero kaj komuniki ĝin al ĉiuj korespondantoj aŭ aliaj personoj, kiuj povus interesiĝi. Prospekto estas presita kaj povas esti mendata senpage ĉe la redakcio de Svisa Espero (Hangweg 57, Liebfeld-Bern). La decido pri la okazigo de tiu aranĝo estas farita en la kunsido de la centra komitato de SES la 13an de marto. Pri la detaloj ni povas ĝis nun sciigi jenon:

La Beneluksa Kongreso en Lieĝo

Estas tempo por aliĝi kaj mendi

En nia proksima numero aperos la tute definitiva programo de nia Kongreso; sed en la numeroj de nia revuo de februaro kaj marto, niaj legantoj jam trovis fakte ĉiujn informojn.

Ni ilin do momente nur resumas: sed ni, antaŭ ĉio, insistas por ke ĉiuj TUJ uzu la aliĝilon, kiu estas kunsendata kun la nuna numero, kaj ĝin tuj resendu al la L.K.K., por ke tiu ĉi havu la okazon ĉion aranĝi plej konvene.

Rilate al la Honora Komitato, ni aldonu ke, intertempe, ankoraŭ akceptis esti membro de ĝi: la provincestro S-ro R. Clerdent; la du senatanoj kaj eksministroj A. Buisseret kaj L.E. Troclet; F. Renard, provinca estrarano, kaj J. Pirmez, provinca prezidanto de la Ruĝa Kruco.

Kiel membroj de la skabenaro, kiuj jam akceptis sed kiujn ni ne nome citis, ni notu: s-rojn J. Arets (socia antaŭzorgo), Ch. Bailly

(urbaj laboroj), M. Denis (Industriaj Servoj kaj Regioj), J. Lemaître (Financoj) kaj N. Noirfalise (Komerco kaj mezaj klasoj).

Pri la programo, ni memorigu, ke la precipaj aranĝoj estas similaj al tiuj de ĉiuj niaj kongresoj. Sed ni atentigas pri la fakto ke la Interkonatiga Vespero, kiu fakte estas Balo okazos *sabate* kaj la Granda Vesperfesto, kun teatraĵetoj, kantoj kaj skeĉoj, *dimanĉe* en la „Hôtel Vénitien“, Place de la République, kie cetere ankoraŭ okazos la kunsidoj de la Kongreso.

La komuna festmanĝo aŭ festeno estas antaŭvidata dimanĉe tagmeze en la restoracio de „Vaxelaire-Claes“, Place Maréchal Foch.

Kiel ni diris, la lunda ekskurso iros perŝipe al Huy, kie la tagmanĝo okazos en la salono de la „Sté Royale d'Harmonie“, kaj la reveturo vagonare al Lieĝo, por tiuj kiuj, de tiu ĉi urbo, refoiros al sia hejmurbo. Kelkaj tamen povos, jam en Huy, forlasi la grupon kaj rekte ekvojaĝi hejmen.

Kiel ankaŭ anoncite, la Meso aranĝita por la katolikaj kongresanoj, estos dirata de Abato Muller, en la Preĝejo de la Sta Sakramento.

KAJ NUN, ĉiuj, kiuj ne jam aliĝis, ALIĜU TUJ kaj la membroj de la Honora Kolono ensendu, same rapide, sian aliĝilon kun la diversaj mendoj.

Ni fidus je la akurateco de niaj membroj!... Dankon!

AL HELSINGÖR

Ĉu vi deziras vojaĝi al Helsingör, kaj restadi tie 10 tagojn en internacia Esperantista rondo?

La 16-an de julio denove iros nederlanda karavano al Helsingör (Danlando).

La vojaĝprogramo estas tre alloga kaj la prezoj estas malaltaj.

Petu senpagan prospekton al: s-ino S. Feitsma-Edzers, Grachtstr. 9, WINSCHOTEN.

Peranto por Belgujo: dro T.v.Ginder-taalen, Raghenoplein 9, Mechelen.

LA POETO DE FLORINA

Premiita en la Literatura Konkurso Beneluxa

— Pardonu, Fraŭlino; ĉu ne estas vi, kiu respondis mian anonceton?

— Kredeble, sinjoro...

— Mi nepre ĝojas pri via ĉarma aspekto, fraŭlino!

— Ne flatu, sinjoro!

La dekokjara Florina foje legis gazetanonĉon, laŭ kiu junulo deziris konatiĝi kun plaĉa, loga junulino; skribe ŝi rendevuis kun la nekonato je la sepa vespere apud la angulo Granda Placo-Preĝejstrato. Li atendus tenante „La Nova(n) Gazeto(n)” en la dekstra mano; ŝi ludus per verda poŝtuko.

Florina estis kudristino kaj perlaboris la tagan panon en proza laborejo. Kompreneble ŝi ne povis prisilenti la agrablan antaŭviditan aventuron kaj ŝiaj amikinoj vigle interesiĝis pri la afero, tiel eĉ ke, la grandan tagon, je la sesa kaj duono, ses el ili tramis kun nia „heroino” al la fiksita loko. La knabinoj ĉiuj konis la signalon de l' junulo.

— Jes, jen jam li, unu konstatis, kiam ili atingis la Grandan Placon.

Kaj ja Florina kaj la tuta bandeto ekrimarkis sveltan, elegantan junulon, kiu iom malpacience rond-iradis ĉe la stratangulo.

— Nenia dubo! Estas li!

La gaja bando tro brue ekridis kaj Florina petegis ke ili ne fuŝu la aferon. „Prefere diru kion vi opinias pri li”, ŝi diris. La aliaj entuziasme ĥoris: „Belulo vere! Vere sinjoro! Vi estas bonŝanca! Nepre!”

Tiu laŭdado, post la unua preterpaso, kuraĝigis Florina-n. Post la disiro de la kunuloj, ŝi svingetis la verdan poŝtukon kaj aliris la nekonaton.

Li jam rekonis la signalon kaj ride-tante li proksimiĝis al ŝi.

La gejunuloj interŝanĝis la salutparolojn supre cititajn.

De fore la amikinoj scivole sekvis la komencantan idilion kaj ili ankoraŭ gaje interbabilis, kiam la „nova paro” jam promenadis for, kvazaŭ malnovaj gefianĉoj.

— Nu, Florina? estis la ĝenerala demando, kiam la postan matenon nia „heroino” reaperis en la laborejo.

Superfluis ŝiaj klarigoj! Ŝia radia vizaĝo estis sufiĉe elokventa; triumfe

ŝi ekkriis: „Estas poeto!”

Poeto! Imagu!... La fianĉoj de la aliaj estis lignajistoj, forĝistoj, ŝuistoj... Nur la nigra Maria „havis” asekuroficiston, kaj kiom ŝi fieregis tial! Sed poeto! Ververe, tiu vorto imponis — precipe ĉar ili eĉ ne sciis ĝian ĝustan signifon!

— Nu, ĉu vi certas? demandis la amikino de la asekur-oficisto, ĉar ŝia prestiĝo nepre endanĝeriĝis.

— Jes, li ja facile povas aserti tion, sed... aldonis alia.

Petole ridis la okuloj de la feliĉa Florina.

— Kaj se mi montrus al vi la unuan poemon, kiun li verkis, kiam mi estis kun li en trinkejo? ŝi provoke demandis.

— Neeble! Neeble!

— Jen do!

Kaj mirigante la amikinojn, nia „heroino” malfermis sian mansaketon kaj eligis purpuran leterpaperon, malfaldis ĝin kaj voĉlegis:

Neniam plu forgesos mi

Ĉi tiun vesperhoron:

Nerezisteble kaptis Vi

Mian jam aman koron!

Kiel Venuso inter mil

Flagrantaj noksteletoj.

Jen via fajra okulbril'

Promesas mil sekretojn...

— Ĉi tie forgesu la sekretojn kaj laboru! subite interrompis la seka voĉo de la labor-estrino, ĵus enveninta. Kiel aro da paseroj, la laboristinoj disfuĝis al siaj seĝoj kaj denove ek-kudris.

De tiam ĉiuj iom enviis la bonŝancon de Florina. En ties manoj vere pluvis la poemoj, kvazaŭ fruktoj de Edena pomujo. La fontoj de la elokvento kaj de l' romantismo ŝajnis neelĉerpeblaj ĉe la juna loganto de l' Parnaso. En la laborejo la estrino apenaŭ turnis la antipatian dorson, kaj jen la kudriloj jam haltis kaj unu aŭ alia petis:

— Florina, legu, legu la lastan poemon!

Ĉiuj knabinoj ja ŝatis tiujn amovortojn, mielajn kiel en la plej erotika filmo.

Post tri, kvar semajnoj tamen la

Reĝa Belga Ligo Esperantista

La anoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista estas petataj ĉeesti la jaran kunvenon, kiu okazos sabato, la 24an de aprilo 1954a, je la 16a horo, en la „Brasserie de la Justice”, Justeca Placo, Bruselo (tutapude de la Centra Stacidomo).

Tagordo:

1. Raporto de la administrantaro
2. Aprobo de la bilanco de la jaro 1953a
3. Fiksado de la kotizo
4. Budĝeto 1954a
5. Laŭstatutaj elektoj
6. Diversaĵoj.

Rimarko. La Grupoj estas petataj proponi kandidatojn por la administrantaro. Grupanoj, kiuj ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunvidon, povas anstataŭigi sin de alia membro, donante al li skriban ateston

La Prezidanto

La administrantaro de la Ligo kunvenos en la sama salono jam je la 15a horo kaj, - tuj post la ĝenerala jarkunveno, - la nova administrantaro denove kunsidos kaj eventuale daŭrigos la priparolon de la tagordo

poeto eksilentis. Nu, ĉiu kompetentulo pri literaturo scias ke eĉ la plej grandaj poetoj mutas de temp' al tempo, ĉu ne? — sed fraŭlinoj-kudristinoj ordinare ne pristudas literaturon kaj miris pri la neklarigebla, abrupta elĉerpiĝo de la poemfonto.

— Ĉu la poeta fajro estingiĝis? la plej envia Maria ŝerce flustris iom iagon.

— Mi riskus veti ke la birdo flugis for al aliaj sferoj, ridis alia, kiu ĵus legis tiun esprimon en romaneto.

Estis vere strange ke nun ankaŭ Florina, kvankam ne poetino, silentis! Ŝi silentis pri la poeto, pri la poezio kaj eĉ pri la amo! Kiam iu ajn aldis la amaventuron, ŝi evitis rektan respondon.

— Mi ne plu montras la poemojn al vi, ĉar vi ja tro primokas min, si finfine klarigis.

— Nu, Florina, nu, neniel ni mokas!

Sed Florina plu obstinis.

La amikinoj tamen dubis kaj iĝis

BELGA KRONIKO

ANTVERPEN

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo”

(Poŝtĉekkonto 726.54)

La 19an de februaro, S-ro Hugo Jacques paroladis pri „La Historio de la Papero”. Tiun tre detalan priskribon de la evoluo de la paperfabrikado, la paroladisto ilustris per multaj lum-bildoj, kiuj plifaciligis la komprenon de la kelkfoje iom teknikaj klarigoj. La prezidanto varme gratulis S-ron Jacques, kiu, kiel presisto, plene sukcesis interesigi ĉiujn.

La 26an, la teatra sekcio prezentis la jam tiel malnovan, sed ankoraŭ ŝam allogan „Sovaĝulino”, de Roksan, unu el la unuaj pionirinoj, kiu, en la heroa periodo de antaŭ la du mi-

pli kaj pli scivolaj: ĉu Florina ankoraŭ ricevas freŝajn poemojn? Tion ili nepre volus scii!

Iun matenon Florina devis forlasi la laborejon por fari kelkajn aĉetojn en la urbo. Sed la mansaketon, en kiu ŝi kutime kunportis sian nutraĵon, ŝi postlasis. Kaj kiam la labor-estrino momenton foriris, la maldelikata kaj envia Maria ne hezitis, malfermis la saketon, kiu antaŭe entenis la poemojn. Kaj vere, ŝi rimarkis la konatan purpuran paperon; do, Florina malgraŭ ĉio ricevis „poezion”!

— Jen, mi havas novan poemon, ŝi flustris al la scivolaj amikinoj.

Sed subite Maria ekridegis:

— Aŭskultu bone, vi ĉiuj...Ha! ha! ha! Estas vere amuze!

Kaj per ŝerce malgaja voĉo, la maldiskretulino deklamis:

Adiaŭ, bela fraŭlinet'

Adiaŭ, ho vipero, —

Kvankam estante nur poet'

Mi vivas sur la tero!

Adiaŭ, ĉar angela korp'

Kovraj' diabla estas!

Animo nigra kiel korv'

En la interno nestas.

Venenaj ridegoj eksonis kaj sonis tra la laborejo eĉ ankoraŭ kiam la mastrino aperis: ĉi-foje ŝia virkata mieno ne sukcesis kvietigi la ĝojon!

Eksciante la okazajon, Florina terure ekkoleris. Sed tiel ŝi perdis ne nur sian poeton, sed krome kelkajn amikinojn...

P. Van der Poel.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPEN

Por via MUZIKO.

RADIO kaj GRAMOFONO

la multnombra ĉeestantaro.

Dimanĉon, la 14an, posttagmeze, pli ol tridek membroj, inter kiuj ankaŭ multaj novuloj, kuniĝis ĉe la enirejo de „Schoonselhof”, de kie ili sekvantare iris al la tombo de la Fondinto. S-ro Jaumotte tie elparolis kelkajn trafajn vortojn, kiuj estis kvazaŭ la atestigo de la membraro de la Grupo al la fondinto, ke lia laboro ne estis vana kaj ke ĝi estas daŭrigata senlace, - en plej bonaj cirkonstancoj kaj en plej bela harmonio - de ĉiuj, kiuj lin konis kaj de multaj aliaj, kiuj poste akceptis saman idealon. S-ro Jaumotte tiam demetis florgarbon nome de la Grupo, dum S-ro Schoofs, akompanata de sia bofilino, per kelkaj vortoj, dankis. Lasta floramasigo kaj saluto de ĉiuj ĉeestantoj estis la konkludo de tiu ĉi en sia simpleco tamen tre emociga ceremonio.

Programo de la venontaj kunvenoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw”, Frankrijk, 4, je la 20,30 h. (1a etaĝo).

APRIL: la 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: Parolado de F-ino Math. Hofkens pri „Svisujo”; la 16an Sankta vendredo: Paska atmosfero; la 23an: Teatra elsendaĵo; la 26an (sabato): Printempa Balo; la 30an: Amuza Vespero kun kanta parto.

MAJO: la 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Parolado de F-ino Hél. Hofkens pri „Malnova Egiptujo”; la 16an (dimanĉo): SURPRIZA aŭtoĉar-ekskurso; la 21an: Diskutvespero; la 28an: Kabareda Vespero.

BRUGGE

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero 4835.33)

La 16an de februaro, post leciono de la elementa kurso, okazis amuza kaj lerniga portretludado.

En la kadro de la parolata gazeto de la 23-a de februaro, S-ro F. Clauwaert antaŭlegis pri „Basketpilko”, F-ino Is. Van Parys pri „Kafejoj” kaj F-ino H. Seye pri „Militista Humorajo”.

La 2-an de marto, pro Karnavalo ne okazis ordinara kunveno, sed dekduo da gemembroj ekskursis al la marborda urbeto Heist, kie ili admiris la vesperan sekvantaron de la maskitoj, kaj

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejode „Bruga Grupo Esperantista.”

Tel. 314.59

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

mem maskitaj partoprenis en rondodancoj sur publika placo por fini la vesperon en dancejo. La horoj tiel rapide forpasis, ke la ekskursintoj devis kuri por ne maltrafi la specialan vagonaron je la 1-a matene.

Dum la kunveno de la 9-a de marto estis raportata pri tiu karnavala ekskurso kaj kanto estis komune lernata.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde je la 20a en la sidejo: „Gouden Hoorn” - „Cor-net d' Or”, Simon Stevinplaats, 2;

La unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono de elementa kaj ripetiga kurso. Dum la dua horo de la kunvenoj:

APRILLO: 6-an-Komuna legado de B.E.;

13-an-Parolata gazeto;

20-an-Triopa interbabilado;

27-an-Muzika vespero;

MAJO: 4-an-Raportado pri la kermesa foiro;

11-an-Komuna legado de B.E.;

18-an-Portretludado;

25-an-Humoraĵoj;

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero 1230.48)

Kiel kutime niaj kunvenoj estis bone vizitataj, kaj speciale multnombre la gesamideanoj venis la 22-an de februaro por aŭskulti la tre interesan prelegon de Sino Lefebvre pri JUGO-SLAVUJO kaj ĝiaj popoloj. La diversaj temoj estis zorge elektitaj, kaj la prelego tre bone legata de Sino Elly Staes, kiu anstataŭis S-inon Lefebvre, kiu estis malhelpita legi mem sian prelegon. La 1-a de marto estis — kiel ĉiam la unua kunveno de la monato — dediĉita al la parolata gazeto. Estis S-ro Van der Stempel, kiu akiris per sia artikolo: „Kiamaniere oni lernas legi ĉe la radio” la plej altan poentnombron. La 8-an de marto ni havis sukcesplenan filmprezentadon, prizorgatan de D-ro Paul Kempeneers. Li montris tre belajn filmojn pri tri antaŭmilitaj landaj kongresoj kaj du internaciaj kongresoj (Vieno, 1936 kaj Londono 1938). Estis vere plezuro revidi tiujn filmojn, sur kiuj oni rek-

onis multajn bedaŭrinde nun jam forpasintajn gesamideanojn. Tre agrabla vespero, pasigita inter malnovaj amikoj.

Programo por la estontaj kunvenoj:

APRILLO: (memorigo): la 5-an: Parolata ĵurnalo; la 12-an: S-ro Swinne: pri la stampado de banknotoj; la 26-an: F-ino Isaacson, pri „La Vivo sekreta de granda Magazeno”; lundon la 19-an, - paskan lundon, - ne okazos kunveno MAJO: la 3-an: Parolata Gazeto, la 10-an: S-ro Castel: Miguel de Unamuno renkontas Alphonse Daudet; la 17-an: S-ro VanderStempel: Perfekta kurso; la 24-an: S-ro Van Geit: Insektoj (tria parto); la 31-an: Sino E. Staes: Pri Muziko.

Funebro

Malnova samideano mortis

Ni eksciis pri la morto, en Bruselo, de tre malnova samideano S-ro Swalf, kiu, tuj post la unua mondmilito, ludis rolon en nia antverpena grupo „La Verda Stelo”, kies kastisto li momente estis, dum liaj gefiloj kaj genevoj ankaŭ aliĝis al nia movado.

Li, de multaj jaroj, forlasis niajn rangojn, sed ĉiam restis fidela al sia esperanta idealo kaj kun plezuro revidis, de tempo al tempo, la malnovajn amikojn, kiujn li havis, same en Bruselo, kiel en Antverpeno.

Ni danke memoros pri li.

Prezidinto de F.L.Esp.

Kun bedaŭro, ni eksciis pri la morto, en plena somero de la vivo, kaj post grava malsano kaj operacio, de S-ro Rainson, el Mehleno, kiu antaŭ la dua mondmilito estis prezidanto de Flandra Ligo Esperantista.

Ni prezentas al lia vidvino, al liaj infanoj kaj al Flandra Ligo la esprimon de niaj sinceraj kondolencoj.

BIBLIOGRAFIO

LA NORMANDAJ RAKONTOJ, de Guy de Maupassant: trad. Roland Dupuis. Tolbindita kun ora surpresio, 212-paĝa. Jen unu el la plej belaj verkoj ĝis nun aperintaj; elstara tiel laŭ eksteraj kiel laŭ enhavo, pri kiu la esperantistaro prave povas fieri, kaj kiu inde reprezentas nian tradukitan literaturon. Ĝi enhavas 18 novelojn de la fama franca rakontisto Guy de Maupassant (1850-1893), zorge elektitajn de la tradukinto, kiu mem naskiĝis en la regiono, kies loĝantoj rolas en ĉi tiu verko. Per akra observemo kaj elstara rakonta talento Guy de Maupassant vivigas al ni la loĝantojn de la kampara regiono de Normandio kaj iliajn karakterizajn ecojn: ruzecon, avarecon kaj energion, kaj kvankam kelkaj epizodoj ŝajnas apenaŭ kredeblaj, ili tamen baziĝas sur efektivaj okazajoj. La rakontoj estas tiel interesaj, ke estas malfacile fermi la libron antaŭ ol oni atingis la lastan paĝon. Estas neeble citi ĉiujn rakontojn, aŭ fari elekton, ĉar ĉiuj ja estas majstroverkoj, jen vekantaj simpatian, jen kompatan aŭ ridemon. Kiel vivantaj personoj aperas antaŭ ni La Boitelle, la kompatinda mastro-Hauchecorne, la ruza Chicot, la avara sinjorino Lefebvre, la dika Toni-mia-Brando, kafejestro de Tournevent, patro Milon kaj la aliaj tipoj kiuj estas priskribataj en ĉi tiu verko. Laŭdon al la tradukinto, ĉar ankaŭ laŭ lingva vidpunkto la verko estas elstara. La rakontoj legiĝas kvazaŭ ili estus originalaĵoj. Iom nekutima vortordo, kelkloke konstatabla, kiu estas uzata por konservi la koloron de la dialekto, ne tro ĝenas kaj volonte oni pardonas al la tradukinto kelkajn pekojn pri la apliko de la refleksiĝa pronomo, eraran uzon de absoluta participo (p. 74) kaj kelkajn aliajn negravajn. Kvankam mankas klarigoj de

MEDITODA PENSO

Vero estas ĉiam simpla, nur eraro kaj mensogo estas komplikaj.

Ŝa Pu Pej.

kelkaj vortoj, kiujn oni vane serĉas en P.V. (sirmio, volovano, taluso, arako), ilia traduko apenaŭ prezentos malfacilaĵojn. La libro krome enhavas antaŭparolon de la tradukinto kaj enkondukon de H. Defontaine, kiu regustigas eraran juĝon pri la aŭtoro. Multaj intertekstaj bildoj, ok tutpaĝaj reproduktajoj, el kiuj du koloraj kaj geografia karto de Normandio kontribuas al la ĉiurilate alta nivelo de la verko, kiun eldonis Eldona Societo Esperanto, Stockholm. La libro estas havebla ĉe niaj libroservoj. Prezo gld. 12,—; b.fr. 160.

A. J. K.

„LA BAPTO DE CARO VLADIMIR” de Karel Havlíček Borovský:

Legendo el la rusa historio. El la ĉeĥa esperantigita kaj komentita de Tomas Pumpr kun portreto de la aŭtoro kaj kun 53 desegnaĵoj de Josef Lada; kovrilo de John Hartley — STAFETO, Belliteratura eldonserio 2 — 1953 — 144 p. — Prezo: 1.50 Us. dol.

La fundamenta tono de la ĉeĥa literaturo restis ĝis en la 19a jarcento nacia kaj sociala en demokratia senco. Karel Havlíček (1821—1856) estis unu el la pioniroj de realisme pensanta generacio kaj iĝis verkisto de klasika signifo en periodo, kiam la liberalaj ideoj pli kaj pli enpenetris la habsburgan regnon kie ili estis severe kontraŭataj de despotisma reĝimo, apogata de trodependa eklezia hierarĥio.

Krom la karakteriza fakto, ke Havlíček estis la unua ĉeĥa tradukinto el Voltaire, „La Bapto de Caro Vladimír” pensigas pri alia franco, nome Rabelais. (I.a. la cinik-burleskan „Marŝon de la Jezuitoj”, ŝajne inspiris sam-speca fragmento en „Gargantua” — ĉap. XXXVIII). Sufiĉas por ekhavi ideon pri la spirito de la nune esperantigita verko en dek „Kantoj”, eksterlande preskaŭ nekonata malgraŭ tradukoj en la ukraina, rusa, germana, slovena, angla kaj pola.

La ĉeĥa raso ŝajnas ja iom parenca al la franca pro ĝia emo al logiko kaj racionalismo, nehavante tamen ties facilan skeptikismon kaj gajan ironion. La sana gajo, la humoro, iam skribis la ĉeĥa akademiano H. Julínek, estas planto kiu ne prosperas sub la klimato de Bohemujo. Tial la ĉeĥa humoro plejofte identas kun malamo, malestimo, malespero. Kredeble la historia subpremado kaj suferado de la ĉeĥa popolo metis tian stampon sur

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10 % por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
Suoĵ — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66.
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Ĉiuj anoncoj kaj reklamoj en tagĵurnaloj
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Begijnestraat 3, Antverpeno.
Okulvitroj — Rabato de 5 % por la membroj. Tel. 35.09.32.
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-eksploato. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteir. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj.
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumajoj
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj, ĝardenilaro
Butiko Angora (novaj galerioj), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj; sportŝuoj

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81 Frizisto por sinjorinoj.
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07.
M. Blajwas, Lange Kievitstraat 80, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nells, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liéens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saïno 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX” 16, rue Esnest Laude 15.28.29

ĝian literaturon...

La vivo ankaŭ de l'tro frue mortinta Havlíček, ido de energiaj montanoj, arda patrioto, sagaca politikisto kaj brila ĵurnalisto, ĉiam sur la barikado, estis ege maldolĉa. Post religia krizo dum li estis seminariano, li sin manifestis kiel senlaca sed neniel objektiva kontraŭbatalanto de absolutismo kaj klerikalismo, kio estigis sur la literaturo kampo ducenton da epigramoj i.k. la priktraktatan verkon, kiu entenantas aktualerojn ĉiamajn, estas unu el la plej mordaj paskviloj ekzistantaj.

En detala aldono, la tradukinto, D-ro Pumpr, jam favore konata el „Literatura Mondo” kaj „Ĉeĥoslovaka Antologio” zorgas pri ekzemplaj biografio, klarigo pri la estiĝo de la poemo kaj komento pri la unuopaj kantoj. Temas pri Perun, la Jupitero de la slava mitologio, kiu rifuzinte tondri je ordono de la rusa caro Vladimiro, heroo de multaj popolaj eposoj, estas ekzekutita post kondamno fare de milita tribunalo:

... La soldatoj - akraj knaboj - en ĵuga-arto fortas: ĉiujn siajn paraĝafojn en kuglujo portas.

La Civilan Tribunalon ili mokas trafe: ili ĵuĝas laŭokule, ne laŭparagrafe.

La Milita Tribunalo ne bezonis dikton: el nenio - kiel dio - kreis la verdikton.

Poste la caro, persvadite de la pastroj, ke nova dio nepre estas bezonata, okazigas konkurson por la vakanta „posteno” kaj ĉiuj religiaj kandidato laŭdas siajn meritojn. Jen, tre koncize, la temo de la „nefinita”) verko, pruntita de antikva kroniko, laŭcele aliformigita de la aŭtoro.

Tiu ĉi, metante la orelon ĉe l'popola buŝo, funde studis ĝian poezion kaj saĝon kaj, rekreante ilin, atingis simplecon de kruda popolforto. Oni ja laŭdas la brilan vervon de la ĉeĥaj

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 223.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

La Esperantlingvaj antologioj donas al vi bildon pri la literaturo de diversaj nacioj. Nun ankoraŭ haveblaj estas:

Belga Antologio (flandringvaj aŭtoroj) H. Vermuyten 300 paĝ. broŝ. ordinara

Fr. 60.—

broŝ. pli bona papero Fr. 75.—

Antologio de brazilaj rakontoj, 308 paĝoj - broŝurita Fr. 105.—

Ĉeĥoslovaka Antologio — Ginz & Kamaryt — 468 paĝoj, broŝ Fr. 220.—

Hungara Antologio - Kalocsaij - 450 paĝoj kaj ald., broŝ Fr. 200.— Bind. Fr. 230.—

Kataluna Antologio — Jaime Grau Casas — 400 paĝoj kaj ald. bind. Fr. 96.—

Sveda Antologio — 432 paĝoj — broŝ. Fr. 175.— Bind. Fr. 200.—

Svisa Antologio — A. Baur — 540 paĝoj broŝ. Fr. 200.— Bind. Fr. 230.—

De la belga kaj hungara antologioj, ni povos liveri nur ĝis elĉerpigo de nia provizeto.

Mendu ĉe: BELGA ESPERANTO-INSTITUTO — Oostenstr. 26 — ANTWERPEN

Postĉekkonto No. 1689.58

versoj kun preskaŭ popola kadenco, kiuj - trempitaj en folkloro sprito foje triviale kun satira kromgusto - familiare disvolviĝas al groteska karikaturo.

Ni volonte kredas, ke necesis al la tradukinto „pesi tre atente la vortturnojn kaj zorge elekti la esprimojn por respeguli la familieran etoson kaj la frapan forton de la poemo.” Trapasinte la logiko-kribilon de nia internacia (legu: eksternacia) lingvo la popolaj esprimoj ordinare multe perdas de sia suko kaj spico. Kompreneble ĉi-kaze la komika genro permesis ankaŭ ĉerpi el la vulgara provizo de la lingvo kaj neriĉa rimaro (Ekz. „Jeki/Feki; „Furzo-perdo/merdo”. La tradukinto sendube sukcesis sentigi la „aromon” de la originalo, eĉ pli ol necese (kial?) malfaciligante la taskon per la apliko de internaj rimoj:

... „Mi matene devas pene
rosi kampan valon,
hejti sunon, kaj la lunon
fermi en la stalon”.

kio, en alia traduko tekstas:

... „Sed ve! Tuj matene devas
dio kampon rosi,
en la suno fajre hejti
kaj la lunon ŝlosi.

La kunmetaĵoj pro rimomanko kaj aliaj estas senartifikaj kaj rimoj kun diferenca gramatika formo negliĝe bonefikas. Kio neeviteble perdiĝis je „couleur locale” estas riĉe kompensata per treege amuzaj bildoj, de la ĉeĥa nacia artisto, majstro *Jozef Lada*.

Mallonge, la malfacile tasko estas lerte kaj glate farita de *D-ro Pump* kiu liveris, plenuzante ĉiujn eblojn, naturan, simplan, senperan, ridsonoran lingvaĵon. La klera leganto, se estus nur el literatura vidpunkto, vere interesiĝos pri ĉi tiu kurioza burleska pamfleto, kiu ajn estu lia propra opinio pri iaj akcesoraĵoj. TYNEVERUM.

RAKONTOJ DE VELKINTA FOLIO
— V. Eroŝenko — Malgranda biblioteko 2, Eld. Japana Esperanta Librokooperativo Osaka - kun bildo de la aŭtoro- 40 p. - 1953.

„Dum noktoj malvarmaj, dum noktoj aŭtunaj, dum noktoj solecaj sendormaj, kiam kaŝinte vizaĝon en la kuseno mi penadis deteni min de ploregoj, deteni min de ĝemoj...” kaj tiel kun oftaj ripetoj sekvas sentimentaltaj rakontoj de „velkinta folio” pri kompatinduloj en ŝanhajo, represitaj el „La ĝemo de unu soleca animo” (1923).

Sed mi ne malicete parolu pri tiuj „malgrandaj fabeloj skizoj” de la blinda sentema aŭtoro kiuj malgraŭ ĝemado ĉarmas pro iom naiŭa sincereco kaj lingvaĵo, kiu post tridek jaroj ankoraŭ favore distingiĝas.

TYN.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj sendotaj al B.E. ĝis la 20.4.54)

Poentojn akiris por la n-roj 5 kaj 6: S-ino Ernst (Bruselo) kaj S-roj Ch. De Corte (Blankenberge), Jean Kairis (Stembert) kaj J. Soyeur (Seraing).

SOLVOJ.

5. mastrumistino: najtingalo; onomatopeo; plimultigi; seka frukto; eŭfemismo; aŭtonomio; ventumilo; samdomano; burleska; misiisto; pulvoro; domaĝi; monedo; brano; semo.

Teksto el la poemeto AMEKSTAZ' de Hendrik Adamson. („Dekdu Poetoj” p. 21, kunmetaĵo de K. Kalocsay):

Kisu min, mordu min,
Amu ĝis morto min,
Eble vi morgaŭ min
Ne amos plu.
Eble vi lasos min,
Baldaŭ forgesos min,
Kaj ne permesos min
Vin ami plu.

6. *Hor.*: envi; lito; sorĉa; avel; brog; amelo; ŝlim; rubo; alineo; plani; amendi; reproduktaj; forte; eltir.

Vert.: paraf; niveli; aspir; islaman; linole; arteri; nature; labore; entut; trombon; dejor.

7. SAJNA SUFIKSO.

Aldonu al la radiko respondanta al la unua klarigo unu el la ŝajnaj sufiksoj AD, AN, AR, ER, ET, IL, IN, UL, por trovi radikon respondantan al la dua klarigo. La komenclitroj de la ŝajne derivitaj vortoj, legataj en la donita sinsekvo, formas proverbon.

1. ludilo; en la okulo. 2. numero; korparto. 3. organika fluajo; dolĉaĵo. 4. cilindroforma ilo; bulforma elstarajo. 5. plene kontentigita; diabla. 6. homo; lancisto. 7. ĉiu el la sinsekvaj statoj de evoluado; ĉasbirdo. 8. domparto; mebleto. 9. kaptilo; okulparto. 10. regula arango; sakramento. 11. insekto; tagparto. 12. senti inklino; eligi nevideble. 13. vorto per kiu oni aparte distingigas ion; migranto. 14. dimensio; teraso. 15. tuto da homoj kun komunaj kutimoj; daŭra kuniĝo de pli malpli multaj personoj sub komuna regularo. 16. ekleziestro; skribmaterialo. 17. osto; rebonigo. 18. unue de elektra rezistanco;

markrustulo. 19. aŭdebla aervibrado; versaĵo. 20. ero; parto de teatro. 21. imitindaĵo; ĉiu el la identaj kopioj. 22. osto; denove fari. 23. birdoj ĝin faras; ĝermo el kiu formiĝas ovo.

8. KRUCVORTENIGMO.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Horizontale. 1. ĉirkaŭvolvi(R); metalo(R); lasi la sorton decidi pri asigno. 2. konforme al vero kaj justo(R). 3. movi boaton(R); planto uzata en farmacio(R); glitilo(R). 4. malproksima(R); sufikso(R). 5. plaĉanta al vido(R); naĝbarelo(R); kreado de la homa faro(R). 6. parto(R); malgranda knabino(R); denove(R). 7. korparto(R); malgrandulo(R); paroli(R). 8. moviĝi en aero(R); rimedo(R); kunlaborante plifaciligi(R). 9. karnavala amuzigo(R). 10. el iu metalo; harmonio(R). 11. meti supren malsupren(R). 12. parto de takelo(R); tranĉa parto de armilo(R).

Vertikale. 1. fari ke iu aniĝu al grupo(R); mitologia estaĵo(R); militista kapvesto(R). 2. eligi helan lumon(R). 3. akva floro(R); aparato por levi fluaĵon(R). 4. grasa fluajo(R); almeti por ornamo. 5. du samspecaj estaĵoj(R); trinkaĵo(R); sendangerigo. 6. refaldita bordero ĉe vesto(R); vendejo(R). 7. malutila mamulo(R); bleko. 8. plende krii; sufikso(R); pendanta parto de vesto(R). 9. bonfarto(R); instrumento por tranĉi(R). 10. parazitita insekto(R); deturni. 11. rapida ripetado de du sonoj(R). 12. enkonduki iun en konon pri afero pli malpli sekreta(R); terkulturisto faras tion(R); ĝi ŝirmas kontraŭ inundo(R).

Por viaj esperantaĵoj,
libroj, insignoj k. c.

**Belga Esperanto-
Instituto**

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPEN

kui ankaŭ havigos al vi nacilingvajn
librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj
ĉiuspecan skribmaterialon.

Verantw' uitgever: Rega Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)